La Kongreso aprobis jenan deklaracion:
**KONSIDERANTE** ke por atigi siajn celojn ĉiaj fakoj de la socio sukcesas nur per politikumado, t.e. senĉese efektivigante ian politikon, ĉu ekonomian, ĉu arme-asociigan,
**KONSIDERANTE** ke nia Lingvo atinganta jam sian Centjaran Jubileon ankoraŭ ne sukcesis esti agnoskita de la tutmondaj registaroj, malgraŭ la sindona laborado de ĉiuj esperantistoj kaj kelkaj sporadaj sukcesoj.
**AKCENTAS** la gravecon de adekvata politikumado far ni ĉiuj, kiu tute ne temu pri la ordinara politikumado, kiun ni havas mense, sed pri serioza kaj deca Lingva Politiko ĉe ĉiaj gravaj Oficialaj Institucioj, ĉu lokaj, ĉu provincaj, ĉu naciaj.
**ALVOKAS** por vigla strebado atingi ke kiel eble plej multaj esperantistoj enoficiĝu en tiaj Oficialaj Institucioj, tiele disponigante gravan apogon por la citita Lingva Politiko.
**INSISTAS** por ke ĉiu esperantisto ekagu per la koncernaj demarŝoj ĉe la lokaj Oficialaj institucioj kaj aŭtotitatuloj, kial urbodomoj kaj simile, proponante Esperanton kiel plej trafa solvo por la rilatoj internaciaj, por altiri la mondan turismon k.t.p.

Nia gijona E-grupo partoprenis, pere de iuj el ĝiaj membroj, en tiu kongreso esperantista de Asturio. Sed samamaniere ĝi partoprenis ankaŭ en la landa E-kongreso, kiu tiujare okazis en Vigo. Tien alportis niaj ĉi-urbaj samideanoj la rezolucion de la Astura E-Kongreso, kiu estis akceptita sen opono kaj ankaŭ sen ia ajn komentado.


**En la Hispana Kongreso de Esperanto de 1986, en Vigo**

Alia E-kongresa partopreno de nia **Astura Esperanta Asocio** estis tiu de nia samurbano Julio Argüelles en la **Universala Kongreso de Esperanto** kiu okazis tiujare en Pekino. La urba presaro informis pri tiu fakto. En la 52a numero de **HELECO** estis publikigita artilo de Julio priskribante liajn impresojn pri tiu kongreso. En la sama numero de la revuo estas ankaŭ artikolo de Santiago Mulas raportante pri la **Hispana Kongreso de Esperanto** en Vigo.
En kunsidoj de la estraro de **A.E.A.** en septembro 1986 oni pritemis, ĉefe, tri aferojn: renovigo de la estraro de la grupo, partopreno de kelkaj membroj de nia asocio en la eksterordinara Universala E-Kongreso okanzonta en Polujo en 1987 por festi la Centjaron de Esperanto, kaj ebla kontribuo de nia E-grupo al la solenado de tiu Centjara Jubileo.

La renovigita estraro de A.E.A. restis tiele:
Prezidanto: ***Santiago Mulas Gallego***.
Vicprezidanto: Adonis ***González Meana***.
Sekretario: ***Julio Argüelles García***.
Kasisto: ***Ildefonso Domínguez Losada***.
Kontistino: ***María del Carmen Junco***.
Bibliotekisto: ***José Mª Rodríguez Folgueras***.
Voĉdonantoj: ***María Jesús Fernández***,
***Luis Muñiz Martínez***,
***Pilar Alonso Moro***,
***Faustino Castaño Vallina***,
kaj ***Antonio Román Cantón***.

Por la lerno-jaro 1986-1987 oni disponis la okazigon de unu sola kurso, gvidota de S. Mulas.
En kunsido de la nova estraro, la 18an de novembro, en kiu partoprenis Nicolás Muñiz, Prezidanto de la Grupo **ANTAŬEN** de Avilés, ĉi tiu informis pri aktivado de tiu E-rondo. Interalie li komunikis ke la eksministro S-ro Fernando Morán akceptis sian nomumon kie Honora Membro de tiu esperantista grupo de Avilés, kaj ke oni estas tradukante al Esperanto la verkon “La Profeto” de tiu eksministro. Nicolás informis ankaŭ pri tio ke la E-grupo **ANTAŬEN** planas organizi, por la sekva jaro, la **2an Asturan Kongreson de Esperanto**.
La celebrado de la Zamenhofa tago aŭ esperantista festo de la jaro 1986 estis simile solena kaj riĉenhava kiel tiuj de la antaŭaj jaroj. Post la renkontiĝo de la esperantistoj en la strato **Esperanto** kaj tiea flor-omaĝo, en la teatra salono de la Katedro Jovellanos, Julio Argüelles faris la prezentadon de Miguel Gutiérrez Adúriz, el **Kantabra Esperanto-Asocio**, kiu parolis pri “**100 jaroj de Esperanto**”.
Poste la arta ensemblo “Nobla Ligno” per orgeno kaj flutoj ludis belajn muzikaĵojn de G. C. Riccio, de G. Belli kaj de Haëndel. Sekve la “Infana Ĥoro” de la urba Muzik-Lernejo lerte kaj bele kantis diversajn kanzonojn kaj Kristnasko-kantojn kiujn ili kronis per “Paca Nokto” en Esperanto. Fine, kiel kutime, en iu restoracio okazis la komuna bankedo de la festanta esperantistaro.
Sendube, la sepjara periodo laste priraportita karakteriĝis, kompare al aliaj epokoj de nia historio, pro la intensa, konstanta kaj regula aktivado de nia diligenta kolegaro tiel en nia urbo kiel en aliaj lokoj de la Asturia regiono.